201
PREFECTURE D'ALGER
DEPOT LÉGAL

1re Année — Dimanche 5 Mars 1905 — N° 2

5 Centimes — 5 Centimoj

LA ALĜERA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie.....	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo.....	2 fr. »
France.....	2 fr. 50	Francujo.....	2 fr. 50
Etranger.....	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj.....	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prix sur demande

DIRECTEUR-FONDATEUR
Barthélemy BALS
ADMINISTRATEUR
Louis LANDES

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Ĵurnalo, 7, rue d'Isly, ALGER.
Prezoj laŭ peto

REMERCIEMENT

♣ ♣ ♣

Au nom de l'Esperanto, nous remercions ceux qui ont répondu à notre appel Notre journal vient à son heure, car, peut-être, notre cause entre-t-elle, en Algérie, dans une phase de combat: tous ceux qui sont pénétrés de l'importance, disons le mot, de la grandeur du but poursuivi, doivent nous soutenir, et beaucoup l'ont compris.

Une bonne part de nos remerciements vont à nos aimables confrères de la Colonie et de la Métropole qui ont bien voulu annoncer l'apparition de notre publication.

DANKO

♣ ♣ ♣

Je la nomo de Esperanto, ni dankas ĉiujn, kiujn respondis nian alvokon. Nia ĵurnalo alvenas al sia horo, ĉar, eble, nia afero eniros, en Alĝerio, en fazo de batalado: ĉiuj kiuj estas enigitaj de la utileco, ni diras la vorton, la grandeco de la celo trafita, devas nin subteni, kaj multajn jam ĝin komprenis.

Bona parto de niaj dankoj iras al niaj amindaj koloniaj kaj francaj kunfratoj kiujn bonvolis anonci la apero de nia ĵurnaleto.

Les Expéditeurs et Exportateurs algériens ont intérêt à avoir à leur disposition un organe dont les annonces trouvent des lecteurs *en tous pays*, dont l'un d'eux peut devenir un représentant.

Enfin, tous ceux qui aiment l'Algérie, tous ceux qui, à un titre quelconque, travaillent à sa prospérité, sont intéressés à avoir un journal qui contribue à la faire connaître au dehors, par sa partie « Esperanto », tandis que, dans son texte français, il les renseignera sur ce qui se passe à l'Etranger.

LA DIRECTION.

Notre article « l'Esperanto et les Députés » nous a valu une intéressante lettre que nous insérons à part et que les amis de l'Esperanto pourront faire circuler avec fruit.

LA LANGUE INTERNATIONALE

Il est indiscutable que l'Espéranto ait fait, en ces derniers temps, des progrès énormes. Aveugles sont ceux qui ne veulent pas se rendre à l'évidence de l'utilité de cette langue internationale intermédiaire.

La langue de l'éminent docteur Zamenhof est maintenant répandue dans les cinq parties du monde et, malgré cela, il se trouve des gens incrédules ou... réfractaires, — sans compter les apathiques et les adversaires et Dieu sait si ces derniers sont nombreux ! — qui ne peuvent se résoudre à approuver l'Esperanto. L'union linguistique de la côte d'Azur avait proposé le latin comme langue intermédiaire universelle.

J'ai écrit, à ce sujet, un article dans la « Revue des Industries du Livre », à la suite duquel le Docteur Zamenhof m'a écrit :

Kara Sinjoro.
La « Revue des Industries du Livre » kun via bela artikolo mi recivis kun plezuro kaj mi kore vin dankas.
Via
ZAMENHOF.

C'était la meilleure récompense que je pouvais espérer de ma petite propagande en faveur de l'Esperanto.

Quant au latin, j'ai démontré que son emploi était irréalisable comme langue internationale, à cause des nombreuses corruptions ou complications qui pourraient en résulter.

Tenons-nous-en donc à l'Esperanto qui réalise le vrai type de langue d'intercompréhension à cause de sa richesse et de sa facilité.

LOUIS LANDES.

LA LINGVO INTERNACIA

Estas nekontraŭdirebla ke Esperanto faris dum tiu lasta tempo grandegajn progresojn. Blinduloj estas tiuj, kiuj ne volas konvinki ĝin de la evidenta utileco de tiu helpa internacia lingvo.

La lingvo de la eminenta Dro Zamenhof estas nun disvatigita en la kvin partoj de l' mondo, kaj malgraŭ tio, troviĝas personoj nekredemaj aŭ... neaprobantaj — ne kalkulanta la malfervorulojn kaj la kontraŭulojn, kaj Dio scias se tiuj lastaj estas multenombraj — kiuj ne povas decidiĝi aprobi Esperanton. La « Union Linguistique de la Côte d'Azur » proponis la lingvon latinan kiel tutmonda helpa lingvo.

Mi skribis pri tio artikolon en la « Revue des Industrie du Livre » pri kion Dro Zamenhof min skribis :

Kara Sinjoro.
La « Revue des Industries du Livre » kun via bela artikolo mi ricevis kun plezuro kaj mi kore vin dankas.
Via
ZAMENHOF.

Ĝi estis la plej bona rekompenco, kiun mi povis esperi de mia malgranda propagando por Esperanto.

Pri la lingvo latina, mi klarigis ke ĝia uzo ne estas ebla kiel lingvo internacia, pro la multaj malplibonaĵoj kaj malsimplaĵoj kiujn povos elveni el ĝi.

Ni do gardu Esperanton, kiu estas la vera modelo de lingvo interkompreniĝa pro ĝia riĉeco kaj ĝia facileco.

LUDOVIKO LANDES.

MONOLOGO

La du Kolomboj

MONOLOGO

Du kolomboj reciproke amis sin laŭ karesa amemo.

Unu, enuante en loĝejo rekutimis siajn antikvajn kutimojn, la klubon, la kafejon, cent malbonajn lokojn.

Iam, li troe trinkis tiel, ke oni lin kondukis en arestejon.

Kontuza, malbonstata, trenante la flugilon, kolombo estis liberigita post kelkaj tagoj kaj tre embarasita revenis hejmen la kapo multepeza kaj la stomako malplena.

Agrabla bonodoro venis al lia nazo : li trovis sian edzinon mortintan kaj preparitan kun pizoj.

Larmoj plenigis liajn okulojn, li manĝis la pizojn kaj diris :

— Malfeliĉa virino, kia delikata atento !

ROCHAMBEAU.

FRANÇOIS COPPÉE ET L'ESPERANTO

Dans le numéro de novembre 1904 de l'*Espérantiste,* M. de Beaufront faisait remarquer que peu de littérateurs en renom avaient encore autorisé des traductions de leurs œuvres en Esperanto.

On doit donc fortement se réjouir de l'éclatant témoignage de sympathie donnée à la langue internationale auxiliaire par le célèbre poète François Coppée, membre de l'Académie française, qui a autorisé la publication, en Esperanto de sa charmante nouvelle ***Le premier chapitre de mes mémoires***

La personnalité du traducteur, M. Auguste Capé-Montrosier, qui en quelques mois s'est acquis une autorité incontestée dans le monde espérantiste, les articles remarqués qu'il a publié dans la *Lingvo Internacia*, dispensent de faire l'éloge technique de la traduction, éditée d'autre part avec l'élégance qui caractérise les livres qui sortent de chez M Lemerre, l'éditeur bien connu des Parnassiens.

FRANÇOIS COPPÉE KAJ ESPERANTO

En la numero de novembro 1904, de l'***Esperantiste,*** Sr° de Beaufront rimarkigis, ke malmulte da konataj literaturistoj ĝis nun permesis tradukon de siaj verkoj Esperanten.

Oni do devas multe ĝoji pri la atentigega atesto de simpatio donita al la helpa lingvo internacia de la fama poeto François Coppée, ano de la Franca Academio, kiu permesis publikigon Esperanten de sia ĉarma novelo ***Unua ĉapitro de miaj memorskriboj.***

La personeco de l' tradukinto, Sr° Aŭgusto Capé-Montrosier kiu, per kelkmonata agado akiris nedisputatan aŭtoritaton en la Esperantistaro, la rimarkataj artikoloj, kiujn li enpresigis en *Lingvo Internacia*, liberigas de fari teknikan laŭdon de la traduko, eldonita aliparte kun la eleganteco, kiu karakterizas la librojn presitajn ĉe sinjoro Lemerre, la eldoniston tre konatan de « Parnassiens ».

MUSULMANA LEGENDO ~ Rozo kaj Papilio

Extrait de la « Revue Tunisienne », organe de l'Institut de Carthage :

Malbonaj knaboj persekutis belan papilion kaj estis ekkaptontaj ĝin en ilian reton kiam la malfeliĉulo renkontis rozon kiu lin diris mallaŭte kaj malfermante sian korsaĵon : « Venu kaŝiĝi en mian bruston ; tie ili vin ne serĉos. » Tuj la papilio kaŝiĝis en tia dolĉa rifuĝeto kaj la rozo refermiĝis cirkaŭ lili.

La knaboj perdintaj la vidaĵon de ilia suferinto reeniris domen malkontentaj.

Post iom da tempo, beleta knabino proksime la rozo pasante, admiris ĝian bonodoron kaj ĝian belecon, kaj malfermante tranĉileton, ŝi estis kolektonto ĝin, tiam la papilio antaŭensaltante el ĝia kaŝejo, blindigis ŝin per ĝiajn helaj koloroj, poste ekflirtis antaŭ ŝi.

La knabino volis kapti ĝin sed ŝi nur havis ŝian naztukon kun kiu ŝi ne povis envolvi. Kiam ŝi forlasis persekuti la flugilan insekton, ŝi estis tre malproksime de la rozo ŝi ne retrovis plu

Kaj estis tiel ke du malgrandaj kreitaĵoj reciproke savis ĝian estadon.

Tial de tio momento ili iĝas sendisiĝaj amikoj.

(D'après Emile JULLIARD : « Femmes d'Orient »). P...

EXPLOITATION GÉNÉRALE
DU CAOUTCHOUC
P. BISSONNET
ALGER. *8, rue de Constantine.* ALGER

MANDARENA BOUGIE'A LIKVORO
ALĜERIAJ ĈAMPANIGITAJ VINOJ
Octave LAMBERT
5, Rue Edmond-Adam
ALGER

★ NIA ALĜERA PAĜO ★

ALĜER — La maĵnova aera Urbo

Daŭrigo kaj Fino

La knabinoj estas amuzaj kun sia malgranda harvosto densige kunvindita per kolora rubando. Jam ili havas la ungetojn de manoj kaj de piedoj, kaj iafoje la tutajn malsuperajn kaj superajn ekstremaĵojn ruĝitajn per « henne'o ».

La larĝa pantalono de la virinoj, ilia amplekso, ĉar multajn estas tre dikaj, ne malhelpas ilin havi ian facilmovecon ; kaj, elirantaj malmulte, ili intervizitas, irante de teraso ĝis teraso, paŝegante kun rimarkinda majstreco la altajn ŝtupegojn de l' ŝtuparego formita de tiu ĉi amaso de kuboj : la malnova maŭra urbo.

Per brakoj longe elstreĉitaj, oni interdonas la infanojn kiuj, de ilia juneco, kutimas je tiu ĉi sporto. Ĉiuj ĉi virinoj estas veraj infanoj : ili laŭte babilalas kaj ridas, krietas kvazaŭ ili senĉese disputadus.

Ekbruas en la strato? Ekaŭdiĝas araba muziko, ĉu en la strato je la momento de ia religia festo, ĉu en privata domo je la okazo de edziĝo ? Ĉiuj alrapidas, klinas sin por vidi pli bone kaj al la superloĝanta sciemulo, kiu envidas en ilian aeran bienon, ili montras sian malantaŭan flankon kun mirinda kuno ! La antaŭa flanko estas malofte rimarkinda ; estas malmulte da beletaj maŭrinoj ; tamen la ruĝa koloro, per kiu ili ŝmiras siajn vangojn, la « kohl'o » kiu plilongigas iliajn okulharojn, kaj la ofte viva okulo donas al ili apartan elrigardon.

Dum la somero, la viveco estas malpli granda pro la varmego. Nur je la vespero, la terasoj denove prezentas sian vivan vidiĝon ; sed je la falo de pa nokto, la virinoj ilin forlasas kaj faras lokon al la viroj kiuj, egoiste, ekkaptas ilin kaj tie serĉas iom da malvarmeto.

Antaŭe, la edzinoj kaj filinoj tien alportas pajlajn matracojn, matojn kaj tapiŝojn, por ke ilia « sinjoro kaj majstro » povu tie trovi ŝajnon de molaĵo.

Kaj nokte, kiam la luno, per sia palega lumeto, lumigas al la dormanta « Kasba'o », tie ĉi kaj tie starigas ombroj irantaj ion preni ; kaj, laŭ ilia gesto, oni divenas, ke ili apartenas al homoj penantaj ĉerpi, el ia akvujo, iom da malvarmeto por sia gorĝo sekigita de la « siroko ».

A. CAPÉ.

BELLE OCCASION On offre dans la bonne ville de Bougie, moyennant le prix annuel de **cinq francs**, pour une durée de trois ans, une *Petite Maisonnette* avec jardin de 1.900 m., située dans la ville même, à condition d'y construire deux autres pièces et une petite cuisine à sa charge.

Cette belle occasion n'est offerte qu'à une personne qui propage l'*Esperanto*.

S'adresser à M. BILLIARD, propriétaire à Bougie.

BELEGA OKAZO Oni proponas en la bona urbo Bougie, por jara prezo da **kvin frankoj**, por tri jaroj daŭro, malgrandan dometon kun 1,900 metroj ĝardeno staranta en la urbo mem, la luonto prenante sur sin konstrui en ĝi du aliajn ĉambrojn kaj kuirejeton.

Propangadisto de lalin gvo *Esperanto* estos nur akceptata por tiu bela okazo.

Sin turni al Sro BILLIARD, bienhavanto, Bougie.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris

M. Lledo